# ORIENTA STELO

August/aŭgusto 2012

NUMBER 290 NUMERO

Orienta Esperantista Federacio
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation
Originally founded in April 1932

**Kontaktdetaloj**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Roy Threadgold | Prezidanto | 01371850481 | roy@boydellsdairy.co.uk. |
| Ben Gosling | Sekretario | 01787247737 | benjamin.gosling@btinternet.com |
| Barrie Murphy | Kasisto | 01702472193 | celiaandbarrie@tiscali.co.uk |
| Mark Drake | Komitatano | 02085188094 | marko.drejko@gmail.com |

***Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.***

## Somera promeno – Lee Valley Country Park Sabaton la 18an de aŭgusto

Ni renkontiĝu je la 11a atm la "Pindar" aŭtoparkejo, kiu troviĝas en Windmill Lane, nur mallonga distance post Cheshunt stacidomo. La loko facile atingeblas fervoje de Stratford, Liverpool St., Cambridge, Bishops Stortford ktp. Elirinte la stacidomo, transiru la linion kaj vi trovos la aŭtoparkejon post nur kelkaj paŝoj.

Ni forvagos proks. 1115. Se hazarde vi estos maltrafinta la ekforiron, vi povos voki 07871 258433 (se mi memoros enŝalti ĝin). Kunportu lunĉon.

## Summer walk in Lee Valley Country Park. August 18th.

Meet at Pindar Car Park – just a few steps from Cheshunt Station (connections from Stratford, Liverpool St., Cambridge, Bishops Stortford ) over the railway line.

Meet at 1100 for a 1115 start. Bring your own lunch. If late, try calling 07871 258433 – I might have it switched on!

## Prezidentaj notoj

En aprilo mi trafis la ŝancon ĉeesti la Britan Kongreson en Edinburgo kaj dum du tagoj mi ĝuis mian vivon en tute esperanta etoso.

Dum multaj jaroj mi estas instruisto pri la elementa perpoŝta kurso kaj la akcelerita kurso, kaj tie en Skotlando, mi renkontis du el miaj studintoj. Unu estis planita renkontiĝo – virino el Bath invitis min kuntagmanĝi – sed la dua estis pli hazarda, kvankam mi estis iomete suspekema. Antaŭ kelkaj jaroj mi havis skotan studanton, fervora naciisto, kiu ĉiam gluis la poŝtmarkojn , la reĝina kapo inverse. Antaŭ ol resendi la lecionon, mi ĉiam vaporumis kaj ĝustigis la markon sur la respondkoverto! Nek li nek mi iam menciis la agadon. Nu, kiam mi aliĝis la kongreson, mi mendis viziton al la skota parlamentejo, gvidota de parlamenta stabano, kaj jes, nia gvidanto estis mia antaŭa studento! Ne nur mi estis en la grupo, sed ankaŭ Malcolm Jones, lia meznivela instruisto. Kompatinda ulo! Tamen li bone eksplikis kiel agas la parlamento kaj ni ĉiuj ĝuis la vagadon tra la koridoroj de skota potenco.

**Notu ke nia aŭtuna kunveno okazos la 27an de oktobro ĉe Layer Marney Tower - tre alloga loko.**

Unu el niaj plej fidelaj anoj forpasis nur unu semajnon post nia jarkunveno, kie la ĉiamridetanta vizaĝo de Charles kiel kutime evidentiĝis. Nekrologio sekvas:

## Charles Newman



Tre bedaŭrinde, nia samideano Charles, sesdeksesjarulo, mortis pro kormalsano je la 17a de marto 2012. Li postlasis sian edzinon Frances kaj plenkreskajn gefilojn. Charles esperantiĝis antaŭ multaj jaroj kaj longtempe deĵoris kiel sekretario de la southenda grupo. Tre plaĉis al li studi multajn lingvojn, kaj li ofte amuzis siajn kungrupanojn per vortludoj. Kvankam li ne posedis aŭton, li tamen regule ĉe-estis la federaciajn kunvenojn; se veturigado ne estis havebla, li vojaĝis trajne/aŭtobuse. Cxiuj, kiuj konis lin, sentas grandan mankon.

## Jarkunveno, 10.3.2012

•Ĉeestantaro: Brian Adams, Barrie Murphy, Charles Newman, Ben Gosling Roy Threadgold, Alan Hughes, Joyce Bunting, Wiesław Baszowiecki, Oliver Pereira, Anne Harvey, David Harvey. (11 entute)



•La tago komencis per la kutima diskuto-disputo.
•La sekretario prelegis ridige pri iuj strangaj okazaĵoj en lia ĝisnuna vivo.
• Fotisto alvenis kaj ni pozis por li, ekstere kun la flago.
•La prezidanta raporto temis pri la malpliiĝo de nia anaro. Li menciis, ke li jam invitis pastrojn kaj instruistojn al la kunveno, ankaŭ ke li sercis novan kunvenejon.
•Sekretaria raporto: Ĉe la jarkunveno je la 2-4-2011 ĉeestis 17 anoj kaj unu vizitanto de Hispanujo. Dum la matena promeno tra Braintree ni devis trovi la solvon de enigmo. (Via sekretario kiel kutime perdiĝis!)
Posttagmeze okazis la intergrupa konkurso kaj pokalprezentado. La sekretario prelegis pri pasintaj esperantlingvaj lando kaj pri BEMI. La Prezidanto ege amuze prelegis pri lastatempaj sciencaj eltrovoj.
•La somera junveno en Lavenham estis ja feliĉa tago por mi, kaj mi esperas same por ĉiuj. Dum travilaĝa promeno Ben iom vage klarigis iom pri la loka historio, kaj poste ni ariĝis ĉe lia domo por subĉiela lunĉo,
Nur kvin el ni ĉeestis la kunvenon en Maldono. Ni strebis kun vortludo pri preseraroj, diskutis 'Ondo de Esperanto', ludis 'Kan-u-Go esperante, kaj Alan prelegis pri sia frua vivo. Ben ankaŭ prelegis pri sia stranga aventuro, forlasita sur insulo en la Atlantika Oceano.
Pro iu kialo, ne okazis ĉi-jare la intergrupa konkurso.
•Elekto: ĉiuj oficiroj reelektiĝis, la samuloj.
•ptm: Ĵurnalisto alvenis kaj intervuis diversajn samideanojn.
(Oni povas legi la raportan mallongitan ĉe:
*http://www.thisistotalessex.co.uk/global-language-bring-people/story-15517331-detail/story.html* )
•Filmoj montriĝis pri islanda vulkano kaj pri Ĉinujo.
• Roy prezentis vortludon al ni: Kartoj enhavis la 'Patro nia' en dudek minoritataj eŭropaj lingvoj; ni devis eltrovi aŭ diveni kiujn montriĝis.
• Skrabble ludiĝis de iuj estantaj anoj ĝis la foriro. Bedaŭrinde, la pastroj kaj instruistoj ne alvenis.

**FRED BASSET de ALEX GRAHAM** *agnoske al Daily Mail*

